

Heinrich Heine,
En Majo

*tradukita de Manfredo Ra-
tislavo*

En Majo, kiam ĉiuj
Burgonoj malfermiĝis,
La amo kiel floro
En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poe-
mo "Im Mai" de HEINRICH
HEINE (*1797-12-13 - †1856-
02-17) en Esperanton de
MANFREDO RATISLAVO
(Manfred Retzlaff, Stettiner
Str. 16, D-59302 Oelde,
Germanio, *1938-11-04) en
1982-11-14.*

MR-002-4 / Arg-203-403
(2004-04-05 20:37:00)

*La poemo troviĝas en la „Li-
bro de la kantoj“, sekcio „Liri-
ka intermezo“ (1822 - 1823),
n-ro I.*

Heinrich Heine,
En admirinde bela
maj'

tradukita de Hans-Georg Kaiser

En admirinde bela maj',
dum jam burgonoj krevis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',
dum birdotril' senbridis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo "Im
Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-
12-13 - †1856-02-17) en Esperan-
ton de HANS-GEORG KAISER (Ce-
zar, *1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-24
07:33:04)

*La poemo troviĝas en la „Libro de
la kantoj“, sekcio „Lirika interme-
zo“ (1822 - 1823), n-ro I. La tra-
duko estas korektita laŭ la lasta
ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg
Kaiser en 2004-03-21.*

Heinrich Heine,
En dolĉega Maj'

tradukita de Friedrich Pillath

Printempe en dolĉega Maj',
Dum la burgonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj',
Dum birda kanto sonis,
De l' kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo "Im
Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-
12-13 - †1856-02-17) en Esperan-
ton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-
04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

*Tiu ĉi traduko aperis en Elek-
titaj Poemoj, Berlin: Esperanto-
Verlag Friedrich Ellersiek (2a el-
dono), 1920, p. 13. La origina
germana-lingva versio troviĝas en la
„Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika
intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.
Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedi-
an retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath.*